

& Sur la Parizaj Bulvaroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 464 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Roncevala batalo. Klarigoj (*): '13 Verŝajna preseraro. '15 Apaŝoj estas indiana etno kiu fame tenaca kaj kuraĝa kontraŭstaris usonan konkeron.>

(#Melodio:

<:29> (#Runtsivalsstríðið:

/mi fami mire dooLaLa dore mimi mimi; mildo dore redo dooLaLa dore mimi mimi;

(#Rekantaĵe: mimire doTi LaSo LaLa; dore mimi mi; mido dore redo doLa do Ti La)

)×16)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Bulvaroj! – De Parizo pulsanta kor' kaj centro,
; De ĝia brua febro intensa vivkoncentro!

(×: **Rajdas el Franca lando ili ; kun trezor' en sel' ; blovu kornon Olivant' en Ronceval'.**)

'2 Fidelaj kun koloroj de l' Urb' karakterizo, ;
Bulvaroj, ho bulvaroj, vi estas mem Parizo!

,& Dua:

'3 Sur vi kalejdoskope la bildoj kaj efektoj ; Sin sekvas kaj rapide varias la aspektoj.

'4 Matene, duonokte, dum antaŭsuna horo ;
Balaistino iras al sia taglaboro,

'5 Patrine ŝi atentis pri via tualetoj ; Kaj antaŭ sunleviĝo foriras kun diskreto... ..

'6 Kaj je la sepa venas la laktoportistino ; Kaj baldaŭ poste sekvas zorgema dommastrino.

'7 La oficisto kuras, – kaj ankaŭ midineto, – ;
Rapide al laboro kun nazo en gazeto... ..

'8 Jam je la deka horo fremdulo dum rondiro ;
inspektas la bulvarojn kun nekaŝebla miro;

'9 Kaj ĝue promenadas nun la senlaborulo ; Kaj li gapante staras ĉe ĉiu stratangulo.

'10 Trafikoembarasojn li konas jam laŭ sperto, ;
Sed ĉiam lin reĉarmas klaksona fuŝkoncerto!

'11 Senhalte fluas vivo kaj dum vesperaj horoj ;
Sin sekvas novaj scenoj kun novaj geaktoroj... ..

'12 Gazetvendista bubo diskrias la novaĵojn, ;
Kalkulas la enspezojn, sedne la vanajn paŝojn!

'13 Mizera almozulo pergajnas sian panon; Al ĉiu altendante* tremantan nigran manon... ..

'14 Knabino facilmora kun ĉiu vir' koketas, – ;
Koketas?? – sed kokino pli ĝuste "kokinetas!"

'15 <sonoras noktomezo> Noktmeza hor'!
Noktmezo! – la horo de la paŝoj... ; <Tima voĉo:>
Ho, de l' apaŝoj*?! <La deklamanto:> Mi diras "de la paŝoj"

'16 De policisto, kiu sin paŝtas sur bulvaroj...

,& Tria:

Nun dormu, pacaj burĝoj, sub lia bona gardo!